# Azeninfano

Lindiwe Matshikiza

Meghan Judge

dohliam

3

Esperanto eo

Estis knabineto kiu unue vidis la misteran formon en la malproksimo.

Kiam la formo proksimiĝis, ŝi vidis ke ĝi estas tre graveda virino.

Sinĝena sed kuraĝa, la knabineto proksimiĝis al la virino. “Ni devas teni ŝin kun ni,” la popolo de la knabineto decidis. “Ni gardos ŝin kaj ŝian infanon sekure.”

La infano baldaŭ ekvenis. “Puŝu!” “Alportu kovrilojn!” “Akvo!” “Puuuuuŝŝŝŝŝuuu!!!”

Sed kiam ili vidis la infaneton, ĉiuj saltis malantaŭen ŝokite. “Azeno?!”

Ĉiuj ekdisputis. “Ni diris ke ni gardus la patrinon kaj la infanon sekure, kaj tion ni faros,” diris iuj. “Sed ili alportos al ni malbonŝancon!” diris aliuloj.

Kaj tiel la virino trovis sin sola denove. Ŝi demandis sin, kion ŝi faru kun tiu stranga infano. Ŝi demandis sin, kion ŝi faru kun si mem.

Sed finfine ŝi devis akcepti ke li estas ŝia infano kaj ŝi estas lia patrino.

Nu, se la infano restis same malgranda, ĉio eble okazus alie. Sed la azeninfano grandiĝis kaj grandiĝis, ĝis li ne plu trovisi lokon sur la dorso de sia patrino. Kaj kiom ajn li klopodis, li ne povis konduti sin kiel homo. Lia patrino estis ofte laca kaj ĉagrenita. Iufoje ŝi devigis lin fari bestan laboron.

Konfuzo kaj kolero kreskiĝis en Azeno. Li ne faru ĉi tion kaj li ne faru tion ĉi. Li ne kondutu sin tiel kaj li ne kondutu sin tiel. Li tiel koleriĝis ke iutage li piedbatis sian patrinon al la tero.

Azeno pleniĝis de honto. Li forkuris tiom malproksimen kaj tiom rapide kiom li povis

Kiam li ĉesis kuri, estis jam nokto, kaj Azeno perdiĝis. “I-a?” li flustris al la mallumo. “I-a?” ĝi resonis al li. Li estis sola. Li buklis sin strikte en pilkoformo kaj eniris profundan kaj maltrankvilan dormadon.

Azeno vekiĝis kaj vidis strangan maljunulon, kiu fikse rigardis lin desupre. Li rigardis en la okulojn de la maljunulo kaj eksentis iom da espero.

Azeno restis kun la maljunulo, kiu instruis lin pri multaj diversaj manieroj vivteni sin. Azeno aŭskultis kaj lernis, samkiel la maljunulo. Ili helpis unu la alian, kaj ili kune ridis.

Iun matenon la maljunulo petis Azeno-n porti lin al montopinto.

Alte inter la nuboj ili dormiĝis. Azeno sonĝis, ke lia patrino malsanas kaj vokis lin. Kaj tiam li vekiĝis...

... la nuboj estis malaperintaj, kune kun lia amiko, la maljunulo.

Azeno finfine sciis, kion fari.

Azeno trovis sian patrinon, solan kaj funebrantan sian perditan infanon. Ili fikse rigardis unu la alian longtempe. Kaj tiam forte brakumis unu la alian.

La azeninfano kaj lia patrino kreskis kunen kaj trovis multajn manierojn vivi kune. Iom post iom aliaj familioj ekloĝis ĉirkaŭe.

# Global Storybooks

globalstorybooks.net

## Azeninfano

Lindiwe Matshikiza
Meghan Judge
dohliam